

Christian Morgenstern,
[Nesciant']

tradukita de Willy Nüesch

Nesciant' de l' cel'
vojon ja ne havas,
li en rondo-rel'
tra la vivo sklavas;
fine venos li
al deira bazo,
nur pecigis pli
menson de l' amaso.

Hom' sen celo-sci'
nun ĝin scii povas,
se pri ver' de di'
li nur arde kovas;
se vanteco lin
ne dronigis brute
kaj li de l' tempvin'
ne ebrias tute.

Demandendas do
pri softaj aferoj,
kaj riskendas pro
lukt' por lumkonkeroj;
kiu ne serĉadas
en libero nobla,
sorĉtrompите vadas
en vual' sepobla.

...

*Traduko de la Germana poemo “[Wer vom Ziel nicht weiß]” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-145-290 (2013-08-28 18:38:14)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.